n-ro 46

oktobro 1994

ISSN 0941-9306

# La Merkato

Al la legantoj

- Dum la Universala Kongreso en Seulo IKEF estis akceptita kiel aliĝinta faka asocio de UEA.
- Membroj kiuj pagis sian kotizon por 1994 aldone ricevas la novan eldonon de la IKEF-identecŝildaro.
  La aliaj ricevos ĝin tuj post alveno de ilia kotizpago.
- Novaj membroj jam nun per pago de unujara kotizo povas aliĝi ĝis fino de 1995.

Roland ROTSAERT

---

**Enhavo**

Internacia Tradukreto pere de Esperanto ekfunkcias . . . 3
Anoncitaj aranĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Ĉinio: investantoj bonvenigataj . . . . . . . . . . . . 4
Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko . . . . . . . . . . 5
Ukraino: nova revuo *Ukraina Stelo* . . . . . . . . . . . 5
Pola Radio: ŝanĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . 6
Televida kurso pri komerco kaj ekonomio . . . . . . . . . 6
Terminaro pri konstru-tekniko . . . . . . . . . . . . . 6
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . . . . . . . . . . 7
Adresŝanĝo - transloĝiga servo . . . . . . . . . . . . 8

**La Merkato (LM)** estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** estas jara eldono por la membroj de IKEF. Ĝi ne estas aparte vendata.

**La Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro Frans Josef Braun,
Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**: Ĉe s-ro Roland Rotsaert,
Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32.(0)50.330004.

Atentu ! Parto de *La Merkato* estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

---

**La jara membreca kotizo** estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj.
Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**:
- Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT.

**Perantoj**:

*Cinio*: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao,
CN-710054 Xi'an

*Francio*: S-ro François-Xavier **GILBERT**, F-55000 Longeville en Barrois
(CCP 1275-89 L Nancy)

*Germanio*: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl
(Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

*Hungario*: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio*: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

*Japanio*: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi,
Higasi Koigakubo 3-18-12 (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 1400 enoj)

*Pollando*: S-ro Maciej **PIEGAT**, ul. Dantego 1-B/48, PL-01-914 Warszawa

---

**ITRA: Internacia Tradukreto pere de Esperanto**

Ŝajnas ke tiu reto, post kelkaj ne vere sukcesaj provoj, nun efektive ekfunkcias. Ĝin prizorgas s-ro Daniel DURAND (IKEF 187). Disponeblas 102 tradukistoj por 29 lingvoj en 30 landoj. S-ro Durand jam faris la proponon ke ĉiu kunlaboranto de la reto ankaŭ iĝu membro de IKEF, tiel ke *La Merkato* ankaŭ funkciu kiel ITRA-ligilo. Por informoj kontaktu s-ron Durand: Les Nids, F-49190 SAINT AUBIN DE LIGNE, Francio, fakso 41-78-32-77. Por kompleta adresaro aldonu 4 IRK.

**Anoncitaj aranĝoj**

**23 oktobro 1984: Trilanda Renkontiĝo, Comblain-au-Pont (B)**

organizita de Esperanto-Asocio en la Eŭregiono Mozo-Rejno, Verviers-a Esperanto-Grupo kaj asocio "Al geologia malkovro de Comblain-au-Pont kaj ĉirkaŭaĵoj".

Loko: *Complexe Communal*, Rue du Grand Pré 25, B-4170 Comblain-au-Pont.
Informoj kaj aliĝo: S-ro Jean-Marie Jacques,
Place Verte 23 bte 3, B-4800 Verviers, tel. 087-330292.
Aliĝu nepre antaŭ la 9a de oktobro !

**oktobro 1994: Tri sinsekvaj aranĝoj en Ĉeĥio**

- Prago - kultura kaj turisma (14-17 oktobro)
- Dobřichovice - simpozio "Entreprenado pere de Esperanto" (17-20 oktobro)
- Turismaj perloj de Suda Bohemio (20-23 oktobro)

Informoj: KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice; tel./fakso 42-2-9912126.

**18-21 majo 1995, Ancona, Italio: 55a fiŝkapta ekspozicio**

Informoj pri partopreno aŭ vizito: Fiera di Ancona,
P.O. Box 352, I-60125 ANCONA; fakso +39-71-5897213.

**Ĉinio: investantoj bonvenigataj**

*Revolucia reformado*

Celo de ĉina reformado estas kompleta realigo de merkata ekonomio. La registaro ege kuraĝigas starigon de privataj entreprenoj kaj oni jam forigis multajn limigojn.

---

Ekde la 1a de junio 1994 ekvalidas "kompania leĝo", kiu reguligas akcian kompanion kaj kompanion kun limigita respondeco. Laŭ la leĝo, individua persono aŭ grupo de 2 ĝis 50 personoj rajtas starigi kompanion kun limigita respondeco.

Multaj ŝtataj entreprenoj deficitas kaj ne povas akurate pagi salajron al siaj laborantoj; iuj eĉ jam bankrotis. Por vigligi kaj savi ŝtatajn entreprenojn, aperas multaj metodoj. Iujn deficitajn malgrandajn entreprenojn oni forvendos al privatuloj. Por aliaj iu povas preni, laŭ kontrakto, la tutan manaĝadan taskon kaj pagi imposton kaj salajrojn. Oni ankaŭ restrukturigas ŝtatajn entreprenojn laŭ kompania leĝo kaj transformas ilin en akciajn kompaniojn aŭ kompaniojn kun limigita respondeco. Laste, iujn entreprenojn oni bankrotigas laŭ bankrota leĝo.

*Leĝoj favoraj al eksterlandaj investantoj*

Ĉina registaro bonvenigas taivanajn, hongkongajn kaj eksterlandajn investantojn. La Popola Kongreso faris leĝon laŭ kiu alilandaj investantoj rajtas:

1. investi per mono, maŝinaro aŭ intelekta proprieto (komerca marko, patento kaj nepatenta tekniko);
2. investi en speciala ekonomia distrikto aŭ aliloke;
3. investi sole aŭ kun ĉina partnero;
4. starigi kompanion kun limigita respondeco aŭ akcian kompanion;
5. eksterlanden sendi la profiton kaj alian sumon laŭ ĉina leĝo;
6. pagi laŭenspezan imposton je favora elcento.

   *Entrepreno en speciala aŭ ekspluata ekonomia distrikto pagas imposton je nur 15 %, dum ŝtataj kaj aliaj pagas je 30 %. La entreprenoj kiuj aplikas avangardan sciencon kaj teknikon, aŭ kies produktaĵoj plejparte eksportiĝas, pagas nur je 10 %. Produkta entrepreno kiu daŭras pli ol 10 jarojn, pagas nenian imposton dum la unuaj du jaroj, kaj je 10 % en postaj tri jaroj.*

7. rericevi jam pagitan imposton kiam la investantoj reinvestas en Ĉinio per profito laŭ la leĝo.

Kontaktadreso: Tan Dehong, Nongmu Jiaoyuzu, CN-434200 Songzi, Hubei, Ĉinio.

**Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko**

S-ro Christian DARBELLAY (Kaiserstr. 43/II, D-24143 KIEL, Germanio) preparas novan eldonon de la adresaro "Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko". Se vi estas esperantista sciencisto aŭ teknikisto, nepre tuj petu la demandilon.

RR

**Ukrainio: nova revuo**

Eldonisto Vasyl STANOVYĈ antaŭ nelonge dissendis la unuan numeron de *Ukraina Stelo*, nova revuo sub la aŭspicio de Ukraina E-Asocio (kvankam ne tute nova: ĝi estas daŭrigo de revuo kiu jam en 1913 ekaperis !)

Aparte interesa estis la artikolo pri ebla kreo de "Karpata Ligo". Karpataj montaroj ja ligas Polion, Ĉeĥion, Slovakion, Ukrainion, Hungarion kaj Rumanion. Tia kunlaboro (ideo lanĉita de la E-Centro en Proprad) povas havi ekologiajn, ekonomiajn, politikajn... avantaĝojn.

*Ukraina Stelo* aperos trimonate.
Jarabono kostas 30 guldenojn (UEA-konto: ueeq-t).

**Pola Radio**

Daŭre okazas ŝanĝoj ĉe Pola Radio ! Kontrolu ĉu vi havas la akuratan adreson: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 46, PL-00-977 VARSOVIO. Telefonaj numeroj nun estas (+48-2) 6459-358 kaj 6459-337 (11.00-13.30 h.). Faksaj numeroj (provizore) restas (+48-22) 444-123 kaj 444-119.

Pro perdo de la frekvenco en mezaj ondoj, la E-programoj estas tute restrukturitaj. Petu informilon de la redakcio.

**The Global Economy** (la tutmonda ekonomio)

Jen titolo de televida kurso pri monda komerco kaj ekonomio, farita de multnacia grupo de institucioj kaj uzanta plej modernajn teknikojn (videodiskon, CD-ROM, CD-I...). Ĝi estos elsendata ekde la printempo de 1995.

Kunlaborantoj estas *Educational Film Center* kaj *Annenberg/CPB* (Usono), *Teleac* (Nederlando), *Utbildningsradion* (Svedio), *ABC TV Open Learning* (Australio), *Radio Caracas Television* (Venezuelo).

Certe ekzistos lingvaj versioj por la partoprenantaj landoj. Vidinte la informon pri tiu kurso, mi tuj pensis pri ĝia utilo por la eks-komunismaj landoj. Eble projektoj por traduko al ties lingvoj (aŭ eĉ al Esperanto) estas

subvencieblaj de Eŭropa Unio, Unesco...?

Mi transprenis ĉi tiun informon el *Teleac*-broŝuro, sed mem ne havas pli da informoj.

RR

**Terminaroj: konstru-tekniko**

TAKE (Tutmonda Asocio de E-istoj Konstruistoj, kies prezidanto estas IKEF-ano s-ro Basso) planas aldoni E-tradukon al prikonstrua terminaro de la Eŭropa Unio. Kunlaborantojn bonvenigas s-ro Fabien VAN MOOK, Echternachstraat 24, NL-5224 TB 'S HERTOGENBOSCH, Nederlando.

Vendas terenojn por domoj en Usono (centra Florido):
880 m2 = 5,500 USD
Informoj: Firmao Mini Max Business, Bl. 16A, ap. 58, Gen. Stoletov Blvd., BG-1233 Sofio, Bulgario.

**Aliĝojn** de la lastaj monatoj vi trovos en la identecŝildaro.

**Komercaj petoj kaj proponoj**

Albanio

S-ro Bahri PERAJ, No. 72, Shëngjin-Lezhë, pretas peri por turismaj investoj en sia regiono (interese situata ĉe Adriatika Maro). Serĉas ankaŭ monhelpon por albana eldono de la libro "Ŝanco por Feliĉo" (traduko estas preta).

Ĉinio

Entreprenistoj ĉe Hebei-a E-Asocio proponas: starigon de taksio-kompanio (eksterlanda partnero liveru veturilojn); importadon de veturiloj; eksportadon de vestoj el silko, sportŝuoj, sekigitaj fruktoj k.a.; turismajn aranĝojn. S-ro Liu Zhi-ming, 22 Youyi Nan Dajie, CN-050081 SHIJIAZHUANG, HEBEI, fakso 0086-0311-3032060.

**"Orienta Informaro"** ofertas multajn servojn kaj komercajn proponojn. Petu detalojn de s-ro Vang Bing, 019 Xintong Qianshan, CN-246300 ANHUI; tel. 05668-922549; ĉine, angle, esperante. (vidu ankaŭ LM40)

Litovio

Proponas koncertajn programojn de pluraj grupoj (i.a. "Asorti", famiĝinta en ĉi jara E-festivalo en Budapeŝto); serĉas kontaktojn pri verka kaj turisma interŝanĝo. Litova Centro de Infana Verkado, str. Vilties 16, LT-4761 VISAGINAS.

Nepalo

Eksporto de modaj arĝentaj juveloj kaj metalaj statuoj (faritaj en propra laborejo). S-ro SHAKYA Kabindra Raj, Espero Craft Enterprises, P.O. Box No. 282, Kathmandu; fakso 977-1-226820, telekso 2322 blustr np.

Pollando

Antikvaĵoj, malnovaj libroj. S-ro Mieczyslav MACKIEVICZ, "MATS", ul. Podmurna 13, PL-87 100 TORUN.

Turkio

Persikoj el Malatya-regiono. [Ne estas menciita nomo], P.K. 161, TR-44201 MALATAYA, Turkio; fakso 422-3235876.

Vietnamio

Ĉu vi volas entrepreni en Vietnamio ? Mi volonte helpos vin perante aĉeton, luon, vendon de domoj, terenoj kaj aliaj proponoj. Por certa respondo bv. enmeti 2 IRK. S-ro Nguyen Do Khanh, Phuoc Long Huyé Thu Duc, TP HO-CHI-MIN.

Lastmomente: adresŝanĝo kaj informo pri transloĝiga servo

Post pretigo de la iŝ, s-ro Papenmeier (IKEF 175) komunikis sian novan privatan adreson: Kirchspieler Seite 35, D-61279 Gravenwiesbach-Laubach.

Li krome donis pliajn informojn pri sia firmao "IMS" (International Moving Service, internacia transloĝiga servo) en Bad Homburg. IMS havas partnerojn en okcidenta Eŭropo (ekz. Ziegler en Belgio, Amertrans en Londono, Desbordes en Parizo...), sed ĝi ankaŭ ofertas unikan servon por preskaŭ ĉiuj orienteŭropaj landoj. Se vi deziras detalojn, bv. faksi al IMS en Germanio je numero 6172-459111.